

# **ESPERANTO**

---

## **KAJ KULTURO**

---

### **Internacia Pedagogia Revuo**

Aperas monate sub la aŭspicio de la  
FRANCA ASOCIO DE ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ  
(G. E. E.)

Redakto - Sekretario :  
D-ro Andreo ALBAULT  
11, rue des Feuillants  
Toulouse (Francio)



Eldono - Direktoro :  
H. MICARD, Emerita Instruisto  
Epineux - le - Séguin (Mayenne)  
Francio

N° 3  
MARTO  
1957

Jara abono : 400 fr. fr., pagenda en Francio al  
Edmond BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.  
Post-ĉek-konto : 1438-67 Nantes ;  
aŭ al la landaj perantoj de I.P.R. (vidu 2-an kovrilpaĝon)  
aŭ al la landaj perantoj kaj delegitoj de U.E.A.

# Informoj el niaj Asocioj

Ni opiniis ke la aperigo de la jenaj informoj utilos al niaj legantoj.  
I.L.E.I.

*Funkciuloj* por la periodo 1955-58 :

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, 70, Av. Victor-Ségoffin, *Toulouse*, Francio.

Sekretario, Kasisto, Gvidanto de Centra Oficejo : F-ino Violet C. NIXON, 183, Woodlands Park Road, Bournville, *Birmingham*, 30, Anglio.

Konsilantoj : S-roj HEITMÜLLER, SVANTESSON, TACCANI.

*Membro-Asocioj* :

Aŭstrio, Britio, Francio, Germanio, Italio, Suomio, Svedio.

*Aktivaj reprezentantoj en aliaj landoj* :

Aŭstralio, Belgio, Danlando, Irlando, Izraelo, Japanio, Jugoslavio, Kanaria Insularo, Maroko, Norvegio, Portugalio, Urugvajo, Usono.

G.E.E. (800 anoj) (franca asocio)

Prezidanto : F-ino J. DEDIEU, Licea Lingvo-instruisto (adreso supre).

Generala Sekretario : S-ro F. THÉBAUD, C.C. Jeunes filles, *Caudry* (Nord).

Kasisto : S-ro E. BIDORT, 6, rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.).

S.B.E.T. (192 anoj)

Prezidanto : S-ro Cyril LOVE, 11 Church Walk, Penn Fields Wolverhampton.

Sekretario-Kasisto : F-ino Violet C. NIXON (adreso supre).

LANDA SEKCIO HESSEN de « Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj » (42 anoj)

Sekciestro : Kurt SCHÖNRICH, Hallgarter Str. 10, *Wiesbaden*.

INSTRUISTA SEKCIO ĉe « Slovenia Esperanto-Ligo » (... anoj).

Prezidantino : Sonjo TAVČAR.

Sin turni al Sek. de S.I.E.L. : Marinko GIVOJE, Poŝtfako 275, *Ljubljana*.

E.U.G.I. (135 anoj) (germana asocio)

Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto : S-ro Heino HEITMÜLLER, (23) *Bremen* 8, Waller Heerstrasse 134.

AŭSTRALIA ESPERANTO-SOCIETO DE INSTRUISTOJ.

Prezidantino : D-ro SUMMERS.

Sekretariino : Gertrude POLLARD.

« GRAJNOJ EN VENTO », la *Tutmondaj Interlernejaj Rondo* Marcel ERBETTA, rue des Pins, 66, Bienne-Biel 7, Svislando.

INFORMOJN pri aliaj landaj edukistaj asocioj ni volonte publikigos.

## ATENTU

Post Montevideo, ni devas repensi niajn metodojn. Nedubable ni devas penetri en ĉiujn kulturajn mediojn aŭ **pereti**.

Unu el la rimedoj penetri en tiujn mediojn estas en viaj manoj, karaj legantoj, kaj plie vi mem rikoltos la frukton de via laboro : traduku el la esperantaj gazetoj ĉiujn artikolojn, kiujn vi opinias interesaj por iu gazeto nacilingva... ĝuste elektita.

Tiel vi konigos nian lingvon en larĝaj tavoloj kaj certe vi ricevos nur helpon de koncernaj redakcioj, ĉar vi servos ilin per interesaj artikoloj de alilandaj aŭtoroj.

\*  
\*\*

*Traduko kaj Publikigo*, en la pedagogia gazetaro, de la artikoloj de I.P.R. estas permesata. Nepre estu indikataj : 1° la aŭtoro (se eble lia loĝloko) 2° la fonto (lasante la titolon en Esperanto kaj jene : « Internacia Pedagogia Revuo », jaro, numero, paĝoj).

Ni petas vin sendi 2 pruvekzemplerojn al la redakcio (ni transsendos unu al la aŭtoroj).

# ESPERANTO KAJ KULTURO

## Internacia Pedagogia Revuo

**Redaktejo** : D-ro ALBAULT, 11, rue des Feuillants, Toulouse, Francio.

**Administrejo** (abonoj, ktp.) : E. BIDOIT, 6, rue de la Paix, Baugé (M.-et-L.), Francio.

**Eldonejo** : H. MICARD, Emerita Instruisto, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Francio.

V. M. Thomas

## Kiel verki rakontojn por geknaboj

V. M. THOMAS, kiu naskiĝis en 1907 en karbmineja distrikto de Suda Kimrio, venis al Londono en 1928 kiel instruisto. Li instruas la anglajn lingvon kaj literaturon en « Moderna Mezlernejo » (Modern Secondary School). Li esperantiĝis en 1949; en Pasko 1955, okaze de la Somer-lernejo de S.B.E.T. ĉe Swanwick li diris la jenan prelegon, kiun li afable pretiĝis por Internacia Pedagogia Revuo. — Dufoje, sed vane, ni esperis aperiĝi la kunan ekzemplan tekston kune kun ilustraĵoj : tio longe prokrastigis la aperon.

Mi elektis ĉi tiun temon, ĉar mi havas nenian kvalifon tiurilate. Mi neniam verkis rakontojn por geknaboj, kaj plejeble neniam provos. Se mi estus spertulo, mi devus defendi miajn teoriojn, sed nun mi povas proponi mian nescion kiel pardonepeton.

Miaj prauloj patroflanke, ĉiuj estis trinkejposedantoj, kaj patrinflanke, predikistoj. Bedaŭrinde, mi heredis la trajtojn de miaj prauloj je la patrina flanko, kaj tio miskvalifigas min kiel verkisto tia, ĉar la urua postulo estas ke vi devas neniam prediki al geknaboj. Vi povas montri bonajn ekzemplojn por imitado, sed tio ne kontentigas mian predikeman inklinton. Mi ne povas ne prediki. Eble el vi, tiuj kiuj havas malpli respektindajn prapatrojn, pli bone sukcesos.

Ce la S.B.E.T. Jarkunveno je Kristnasko 1954, la manko de tiaj libroj estis multe diskutata. Nu, ni konsideru, kio plaĉas al geknaboj en literaturo. Komprenoble, la gusto ŝanĝas laŭ la aĝo, kaj varias laŭ sekso, medio kaj fono. Eble via sperto estas tute mala, sed dum 25 jaroj da instruado, mi trovis nur unu libron, kiu plaĉis al knaboj kaj knabinoj de ĉiu aĝo : « Pinokjo » (1). Kial ? Mi opinias, unue, pro la fakto, ke li estas malobeema knabo kiu faras multajn petolojn, kaj troviĝas en danĝero pro tio. Sed, kiam iu plenaĝulo diras « Nu, vi meritas tion ĉar vi estas malbona knabo al via patro, » — la klaso silente malkonsentas. Ili konsentas ke li meritas ĉion, kio okazas al li, sed, di-

rante tion, la plenaĝulo batas Pinokjon kiam li estas surgrunde. Tio, al geknaboj, estas nepardonebla.

Pinokjo rompas promesojn, mensogas, piedfrapas la pardonon pro kolero, sed la geknaboj ne kulpigas lin, ĉar li estas pupo — kiel infano kiu ne atingis la kondut-nivelon de la pliaĝa knabo aŭ knabino. Aliflanke, Tom Sawyer kaj Huck Finn (2) plaĉas al la knaboj, sed tute ne al la knabinoj, ĉar al ili, la knaboj estas krudaj kaj naivaj, nekredible superstiĉaj kaj neplaĉe malgentilaj kaj malpuraj.

Nuntempe, la aŭtoroj kiu plej plaĉas al geknaboj 7- ĝis 11-jaraj estas Enid BLYTON. Siaj verkajoj, al mi, estas tre ordinara kaj havas malmulte da valoro kiel literaturo. Sed ŝi scias la trafan sekreton — t.e. ke kontentas la geknaboj scii kiel io okazas — la rakonto — ne necesas kompreni kial — la evoluo de la karaktero — la konfliktoj en ĉiu homa animo. Malplaĉas al ili trovi bonajn kvalitojn en la malbonulo, aŭ malbonajn en la heroo. Ili nur volas aŭ admiri aŭ malami. La geknaboj volas identigi kun iu relulo, sed, ĉar geknaboj tiom varias Enid BLYTON havas kvar aŭ kvin geheroojn — unu knabema knabino, la « petolulino », unu tre timema dum danĝero, unu ordinara knabo, kaj unu sufiĉe matura por anstataŭi la patron aŭ almenaŭ plenaĝulon.

La amo de infanoj al bestoj ankaŭ havas elirvojon — en la unuaj libroj, per hundo kiu preskaŭ parolas, sed poste, per papago kiu vere ja parolas — multe pli bone. Ankaŭ, estante birdo, li estas permesata uzi esprimojn kiuj ne taŭgas por tiaj bonedukitaj geknaboj. Kiam ajn la papago krias, « purigu vian nazon » aŭ « viŝu viajn piedojn sur la mato », al plenaĝulo, la klaso ĝoje ridas. Sajne, tiuj frazojn la geknaboj sopiras kriegi, sed neniam havas la okazon — nur por aŭskulti ilin. La papago, kiel la pupo, faras tion, kion la geknaboj volas sed timas fari.

Ĉiutage, la kvar gargantue (3) piknikas, kaj, karese, la verkistino erigas la sandviĉojn, kremkukojn kaj frandaĵojn. Neniam ili trinkas teon aŭ kafon — ĉiam zingibran bieron. Estas strange, ke eĉ dum mia junaĝo Billy Bunter (4) trinkis zingibran bieron sed mi preskaŭ neniam renkontas infanon kiu ŝatas ĝin. Nuntempe, ŝajnas al mi ke « Tizer » aŭ « Koka-Kola » pli allogus ilin. Ĉiukaze, la manĝoj estas perfektaj — laŭ infana gusto. Malofte oni legas pri avenkaĉo aŭ spinaco, kaj la butero kaj konfitaĵo estas ĉiam hejmfaritaj — dum la milito ili estis senditaj de Suda Afriko aŭ de onklino en Usono.

La patrino estas ĉiam bonkora, neniam malpacienca senkaŭze, kaj permesas ke la geknaboj partoprenu harstarigajn aventurojn, libron post libro. Ordinara patrino ligus ilin per ĉeno en la ĝardeno. Aliflanke, la patro estas ofte malpacienca, estas tro okupata por partopreni en la interesoj de la geknaboj, kaj estas iome feliĉa nur kiam la infanoj estas for. Ŝajnas al mi ke la patroj de nia lando devas elekti Edwin Blyton (5) por subteni la rajtojn de patroj.

Nun, se vi provos verki ĉi tiajn rakontojn, la unua demando estas — « Pri kio mi skribos? » Ŝajnas al mi ke, por la unuaj provoj, estas konsilinde verki pri la propra fono, sperto kaj medio, ĉar teknikaĵoj de la rakonto devus esti tiel familiaraj ke la cerbo estas libera pensi nur pri la rakonto mem.

Nun — la plej malfacila parto — kvankam vi estas plenaĝulo, vi devas ekzameni kaj juĝi el la vidpunkto de infano.

Kio estas interesa al geknaboj? Kiel ni trovas, kiel sentas geknaboj? Malmultaj sufiĉe komprenas la menson de knabo por scii tion, sed por tiuj, kiuj estas honestaj, mense, estas unu vojo, — verku pri viaj propraj knabaj spertoj. Vi tuj diros, « Nenio interesa okazis al mi dum tiuj jaroj, — almenaŭ nenio sufiĉe interesa por enkorpiĝi en rakonton. »

Sed mi trovas ke, se la priskribo estas knabovidpunkta, vigla kaj bonhumora, ĝi plaĉas al knaboj. Mi ofte pensas kiom senekscita estis mia vivo — mi envias tiujn, kiuj informas Wilfred Pickles (6) pri elstaraj okazaĵoj en siaj vivoj. Sed, eĉ en mia senbrua vivo, kiam mi ekpensis, mi konstatis ke estas kelkaj okazaĵoj, kiuj eble estas priskribindaj:

Ekzemple:

1. *Kiam, kun aliaj knaboj, ni perdis nian vojon sur monto kaj timis fali en ŝtonminejon.*

2. *Kiam amiko mia pendis de kabla ŝnurego sesdek futojn en la aero.*

3. *Kiam ni sukcesis savi ŝafon kiu estis enŝanĝinta en profundan fendon de la monto.*

4. *Kiel ni veturis fulmrapide malsupren*

*de kruta deklivo en difektita karboĉaro sen haltigiloj.*

5. *Kiam ni perdiĝis en montnebuloj.*

6. *Kiam pluvego inundis la valon, kaj ni devis marŝi hejmen laŭ la montdeklivoj dek mejlojn de la lernejo.*

7. *Kiam amiko estis enterigita en karbtunelo elfosita de ni — kaj, kompreneble, malbone fosita.*

8. *Kiam ni tendumis dumnokte sen tendo, kaj ŝtormo trafis nin.*

k.t.p.

Se mi povus priskribi tiujn, kiel ili impresis mian knaban menson, ili estus sufiĉe interesaj, sed la tavoloj de miaj plenaĝaj spertoj estas tro dikaj por trafosi al la suba bazgrundo.

Tamen, por doni al vi la okazon fari viajn kritikojn mi provos, kaj jen, unu rakonto.

## La ŝtonminejo

« Ĉu vi estas preta, Malcolm? » — « Jes, Davydd », respondis mia angla kuzo, kiu libertempis ĉe ni en Suda Kimrio. « Venu, do, ĉar mi devas kolekti la knabinojn ». La knabinoj estis mia kuzino, Morwen, kiu loĝis apude, kaj ŝia amikino Dilys. Dek minutojn poste, la kvar grimpis la monteton survoje al Mardy. Mi ankoraŭ pensis pri la adiaŭaj vortoj de mia patrino, — « Memoru, gardu Malcolm, ĉar ne taŭgas por li la malĝentilaj kutimoj de viaj kunuloj ».

Baldaŭ ni atingis la arbaron, kaj forĝesis ĉion dum ni sciure grimpis altan arbon. El etendiĝanta branĉo, mi falis teren dek du futojn je la admiro de la tri pli junaj rigardantoj.

« Ĉu iu alia volas provi? » mi demandis fiere, sed iom komplete, kaj mi aŭdis Dilys diri, « Jes, mi faros ĝin! » Si estis dektri-jara, nur kelkajn monatojn pli juna ol mi, sed mi ne volis ke ŝi provu. Je mia averto, ŝi spite deklaris, « Se vi povas fari ĝin, mi povas. » En silento, ŝi grimpis la arbon, pendis momente, kaj falis, Neniu parolis, sed, post tio, ŝi estis al mi pli knaba ol Malcolm, kiu nun rigardis ŝin kun miro.

Ni ludis tie tiom longe, ke la horoj nerimarkite forpasis, ĝis: « Mi malsatas! Ĉu ni povas havi nian lunĉon? » petis Morwen. « Certe », mi respondis, « Ni rigardu kion ni havas? » La patrino preparis la lunĉon dum ni vestis nin,

1) « *Pinokjo* » de C. COLLODI. Aperis en esperanta trad.

2) Knaboj en libroj de la usona verkisto Mark TWAIN.

3) *Gargantuo*: ĉefrolulo de fama verko de RABELAIS. Komune signas viron de eksterordinara apetito.

4) Grasega kaj manĝema knabo en gazeto por knaboj.

5) Fantazia nomo por aŭtoro kiu laŭdis patrojn, kiel ENID BLYTON laŭdis patrinojn.

6) Radio-programestro, al kiu homoj respondas al demandoj pri la propra vivo

sed mi ne timis ke la lunĉo estos nesufiĉa aŭ malbongusta. « Ho! ovoĵ kaj ŝinko — kiaj sandviĉoj! » « Kaj hejmbakitaj kukoj! » Limonado kaj lakto » jen la krioj. « Jes », mi diris « sed mi devas rezervi ion por la temango. » « Ne necesas », diris Malcolm, « ĉar onklino metis la temangon en mian dorsosakon. » Do, la lunĉo okupis malpli ol kvin minutojn, kaj ĉiuj estis kontentaj sed malviglaj.

Nun, antaŭ ni estas la malfacila parto de la grimrado, kaj neniu parolis. Kelkfoje ni devis uzi manojn, kaj eĉ kuŝis flanke sur la herbon dum ni serpentumis al la supro. Fine, ni atingis ĝin, kaj ĵetis nin, unu post la alia, teren por regajni nian spiron. Post kelkaj minutoj, « Kio estas tio? » demandis Malcolm, « Tio estas ŝtonminejo », respondis Dilys. « Ĉu ni povas rigardi ĝin? » « Jes », mi diris, « sed estu singardaj — ĝi estas tre profunda, kaj la rando estas malsekura. » Staranta kune ĉe la rando ni rigardis malsupren, sed Malcolm, post la unua rigardo paŝis malantaŭen. « Mi ne ŝatas rigardi », li diris. « Devus esti pli alta barilo », iu diris, « kaj ĉi tiu estas rompita, — ŝafoj povas vagadi tra la breĉo kaj mortigi sin. »

Post tiu malgaja penso, ni komencis iri malsupren, al la najbara valo, kie Mardy estas. Ĝi estas forloga loko, sed ni ĝuis tri horojn en la parko kaj ĉe la rivero. Ni demetis la ŝuojn kaj ŝtrumpetojn kaj ludis en la rivero, kvankam Malcolm ion dube rigardis la malsupran akvon kaj la flosantajn ladskatolojn.

Ni marŝis al Tylorstown, la plej apuda urbeto, por vidi la domon en kiu naskiĝis la fama boksisto, Jimmy Wilde. Ni haltis tie tre longe — estis mia kulpo, ĉar Jimmy estis mia heroo — eĉ pli heroo al mi ol la Princo de Kimrio — kaj mi jam vidis ambaŭ. Mi sciis ke mi neniam povos esti Princo de Kimrio, do mi koncentrigis miajn pensojn sekvi Jimmy Wilde.

Subite mi konstatis ke alvenas la krepusko, kaj mi avertis la aliajn. Rapide ni surmetis la ŝuojn kaj komencis la reveniron. Antaŭ ol ni atingis la montsupron, estis mallume. Kun timo mi rimarkis ke nek luno nek steloj lumigis la ĉielon, kaj ni preskaŭ ne povis vidi unu la alian. Mi kriis, « Ni tenu la manojn, unu de la alia, kaj mi kondukos vin. » Mi tiom ofte iris laŭ tiu vojo, ke mi ne timis ke mi perdos la vojon. La supro de la monteto estas plataĵo, antaŭ la deklivo al nia valo, kaj mi paŝis antaŭen sentime. Post kelkaj minutoj mi sentis miajn ŝuojn en ŝlimon, kaj terurigis, eksciante ke mi estas en unu el la marĉoj, abundaj tie. Mi haltis, kaj tuj kiam mi turniĝis de la vojo, la aliaj konstatis ke ni estas perditaj. Neniu diris tion, krom Malcolm, kvankam Dilys provis deteni lin. Kiam Morwen komencis ek-

plori, mi decidis paroli malkaŝe. « Nu, mi momente perdis la vojon, sed ni ĉirkaŭmarŝu la marĉon kaj ni estos preskaŭ hejme. »

Singarde, ni serpentumis ĝis mi sentis firman grundon sub la piedoj, sed nun la ĉielo estis tiom malluma ke mi ne povis vidi la horizonton. « La ŝtonminejoj! » ploris Malcolm, « Ni ne povas vidi ĝin, kaj ni estos mortigitaj. Ni povas erare paŝi tra la breĉo en la barilo. » « Estu kvieta! » mi diris, sed mi sciis ke li pravas. Denove, mi decidis paroli malkaŝe, — « Ni devas antaŭenklini por vidi la horizonton, kaj tiel ni povos vidi la barilon kontraŭ la iom pli hela ĉielo. »

Tion mi faris, sed ni ne povis vidi ion. Ĉiupaŝe, ni metis la piedon en nigran kavajon, kaj je ĉiu paŝo, mi spiris nur kiam mi palpis grundon sub mia ŝuo. Ofte, mi estis sur miaj genuoj, kaj eĉ kuŝis sur la tero por ekvidi la horizonton. Post eble dudek minutoj, mi apenaŭ povis toleri la doloron en mia dorso pro la malkomforta marŝmaniero, kaj la ŝvito malvarmigis la frunton.

« Jen ĝi! » mi kriegis, kaj tie antaŭ ni estis la barilo. Mi sentis Dilys fortremi mian manon. Nun, ni preskaŭ rampis maldekstren, ĉiam rigardante la barilon ĉe nia dekstra flanko. Subite, antaŭ ni en la profundo ni vidis la lumojn en la valo. Ni ĉiuj staris silente, kaj mi diris, kvazaŭ nenio okazis, « Nun, ni estas hejme. »

Ridegante, ni kuris al la lumoj.

## Ni Kunlaboru

Esperantistaj instruistoj de Serbio proponas al eksterlandaj kolegoj interŝanĝadon pri : 1) infandesegnaĵoj, skribaĵoj, manlaboraĵoj, klasaj aŭ lernejoj gazetoj, fotoj, bildoj, albumoj, ktp. ; 2) pedagogiaj libroj, revuoj, lernolibroj (esperantaj kaj neesperantaj), oficialaj butejoj, prospektoj, broŝuroj, kantaroj, ktp. ; 3) materialo por esperantaj ekspozicioj ; 4) interinstruista korespondado kaj eventuale reciproka gastado dum somero ; 5) organizado de internacia geknaba korespondado.

Karaj legantoj, per partopreno al tiu interŝanĝado vi progresigos Esperanton sur ties plej sekura kampo, la kampo de praktikantoj. Ke vi aŭdis la alvokon kaj elektis tiun aŭ alian eron en la programo bonvolu sciigi al Petar VUKOMANOVIĆ, prezidanto de Instruista Esperanto Sekcio, Kralja Milutina 66, Poŝtfako 319, Beograd, Jugoslavujo.

Kooperativa Instituto de Moderna Internacia Lernejo

Roger Lallemand

# PRI LA LEGINSTRUADO

Plene ni aprobas la ĝustan kritikon de H. GROENDIJK pri la analiza kaj bloka procedaroj por instruadi legadon. Mi kredas ke la atakon de « Colliers Weekly » kontraŭ la bloka sistemo oni povus ankaŭ fari kontraŭ la analiza. Ĉar vere, tiu-ĉi estas multe pli uzata en Francio, kaj oni povas vidi ekzemple, ĉe la elementa ekzameno, ke kandidatoj ankoraŭ sen flueco sekvas la literojn per la montra fingro!

Ni rimarku ke multaj tiel diritaj « blokaj » instrusistemoj tiel rapide forlasas la entutan legadon de frazoj kaj vortoj, ke oni devas fakte ilin konsideri analizaj. Oni tuj perdas la avantaĝojn de blokismo.

De pli ol 25 jaroj, la KIMILanoj komparas procedojn kaj rezultojn, kaj mem mi partoprenis tiun kolektivan eksperimentaron, instruante unue dum du jaroj la analizan, poste dum la sama tempo blokan sisteman legadon, kaj poste fine, ĉiam perfektigante la procedojn, tiun metodon kiun ni nomas « natura », kun la helpo de multaj Kimilaj kolegoj. Mi diros poste kial ni ne ŝatas uzi la vorton « metodon ».

Lasta teknika rimarko, kiu estas la sola kontraŭa opinio al H. GROENDIJK : Eĉ kun la tradicia bloka metodo ni ne konstatis malbonan sekvon pri la ortografia kapablo. Nur unu ekzemplo. Se la infano lernis analize « t » kaj la franca « an », li skribos la vorton « temps » (tempo) tiel : « tan » (tani-lo). Kontraŭe, se li lernis bloke la vortojn laŭ ties senco, li konservos pli facile la entutan bildon en la memoro : « temps ». Li ne kutimiĝos mekanike kunmeti literojn. Ni do ne kredas ke oni atendas tro longe antaŭ ol analizigi vortojn. Tiu rimarko de la aŭtoro ne konformiĝas kun lia konstato ke la analizkapablo ne estas sama laŭ la infanoj ! Se ni devas atendi ĝis tiu analizkapablo estos sufiĉe vigla, ni devas ĝin trudi re tro frue.

Niaj spertoj pravas ke NE tie kuŝas la kaŭzo de malsukcesoj.

Sed antaŭ ĉio, por juĝi pri la rezulto, nepre ni difinu kion signifas « LEGI ». Malfeliĉe, oni konsideras ke infano scias legadon kiam li povas prononci la vortojn de li « legatajn ». Sed fakte li nur scias deĉifri ! Miaj kolegoj de « Moderna Lernejo » ne tiel konsideras la aferon ! Ili estas pli severaj : ili kredas ke legi estas unue kompreni tre bone ĉion kion oni okule sekvas ; kaj tio eĉ ne sufiĉas. Ni konsideras ke niaj lernantoj scias legi nur se ili multe ŝatas legadon.

Kaj fakte ni sukcesis tiel instrui legadon ke ili volas multe legi kaj haltas dum sia legado, se ili ne komprenas la sencon. Iuj rifuzas prononci vortojn kiun ili ne komprenas, eĉ se ili jam kapablas ĝin deĉifri.

Nun venas demando : Nia kolego GROENDIJK bedaŭras ke la bloka metodo havas ankaŭ gravajn malavantaĝojn. Kiel povas esti, se ĝi tiel bone konformiĝas kun la psikologio kaj intereso de la infanoj ? Ni tamen diru ke « gvidi ĉiujn deviaĵojn de la infano » ne estas tiom malfacile, kaj ke sekvi infanajn interesojn estas avantaĝo kaj helpas al la sukceso.

Mi rediru ke laŭ *teknika* vidpunkto ni aprobas krom tiuj malgravaj detaloj la rimarkindan kritikon de H. GROENDIJK.

Ni ŝatas precipe la procedojn priskribitajn, en tiu senco ke ili ĉiam venas rekte el la vivo de la infanoj. Ĉiuj Kimilanoj konversadas kun ili kaj eltrovas la plej viglan kolektivan intereson. Kaj ni skribas sur la tabulon la tekston rakontitan de unu el ili kun la helpo de ĉiuj. Tiun tekston oni ankaŭ kolektive elektis. Certe ĉiuj vigle interesiĝas pri tiu laboro, kiu estas ankoraŭ tute proksima de la emocio infana.

Sed kiam oni komencas « legi por legi », rediri la vortojn, ilin disigi aŭ rekunigi, kia estas la motivo de tia laboro ? Oni ja konas la rakonton de la infano. Oni ja NE BEZONAS ĜIN tiom relegi ! Kial tiu tute prava zorgo pri la intereso de la infano kiam tiu infano parolas kaj rakontas pri sia vivo, kaj NENIU simila zorgo pri la vivo kiam temas pri la skribado kaj legado de la infana teksto ? Do la infano tre bone kaj ĝoje lernas parolatan lingvon, kaj poste ĝi vole-nevole lernas skribadon kaj legadon, kun diskutebla sukceso.

La vera demando estas tiu-ĉi, kiu sin konformas al la unua parto de la artikolo de GROENDIJK : La vera bona metodo NE ESTAS tiu, kiu permesas al la infano plej rapide deĉifri por ĉion prononci. La vera legada instrumentado estas tiu, kiu permesas al la infano serĉi kaj trovi en tekston ĝian signifon. Jen la vidpunkto kiu permesas al ni elekti ĉu analizajn ĉu blokajn procedojn.

Sed por ke la infano ŝatu legadon, la lerneja vivo devas esti tiel organizata, ke li BEZONU skribi kaj legi : Do skribi al IU, por IU, kaj legadi tion, kion al li skribis aŭ presis IU kun kiu li havas amikecan emocijon. Tiel devas daŭri la SOCIA INTERESO de la infano ĝis en la grafika, skriba aŭ presita aspekto de

la vivanta lingvo. Eĉ ni plenkreskuloj ne volus legi tion, kio nin ne interesas, kaj skribi sencele; Kaj la plej interesa teksto por infano estas la skribaĵo aŭ presaĵo de lia persona gekorespondanto. Nur poste estos uzataj rakontoj de aliaj infanoj kaj poste ankoraŭ de plenkreskuloj.

Ni do uzas por parola lingvo la procedojn priskribitajn en la menciita artikolo, tial ke la infanoj ŝatas rakonti pri sia vivo, precipe al siaj kunlernantoj kaj instruist(in)o, **KIUJ NE SCIAS PRI TIUJ OKAZINTAĴOJ**. Sed la sama vigla instigilo, t.e. **SOCIA MOTIVIGO** ne povas esti uzata kiam temas pri surpapera lingvo. Do, kiam nia komuna libera teksto kuŝas sur la nigra tabulo, kion ni faros? Ĉu eĉ la infanoj rakontis por ke oni skribu ĝin sur la tabulo? Al kiu ni montras aŭ sendos la tabulon?? La socian motivigon de skribado-legado ni trovis en la interlerneja korespondado. Sed kun la malgrandaj geknaboj estas necesa **PERSONA korespondado**, kiu ebligas la kolektivajn interŝanĝon de klasaj tekstoj.

Por ke niaj korespondantoj sciu pri la rakontoj de tiu aŭ alia infano, ni **PRE-SAS** ilin. **TUJ** post la plenigo de la presita folio ambaŭflanke, ni sendos **TIOM DA FOLIOJ, KIOM ESTAS DA LERNANTOJ EN NIA KORESPONDA KLASO**. Ĉiu el ili ricevos unu. Kaj ĉiuj volos legi ĝin ĉar iafaje okazas ke precize la teksto estas subskribita de la propra persona kamarado. Ĉiufoje kiam la pakajeto alvenas, unu folio pli estas aldonata en la « **VIVLIBRON** » de la korespondantoj, en detirebla speciala bindaĵo. De tempo al tempo ni ankaŭ skribos al nia kamarado personan letereton. Ni ankaŭ interŝanĝas infanajn liberajn pentraĵojn kun klariga mallonga teksto, kiun ankaŭ volas legi la korespondantoj. Ni ricevas la samajn sendaĵojn kaj profitas ilin tre multe.

Oni multe diskutas pri la aĝo favora por instruado de legado. Vere ĝi ne estas la sama por diversaj infanoj, same kiel la marŝado venas pli malpli frue. En lia « **Psikologio sentimenta kaj edukado** » **FREINET** rimarkigas, ke tamen ĉiuj sanaj infanoj sukcesas perfekte marŝi. En niaj modernaj lernejoj, ni povas kaj rajtas atendi ĝis kiam la lernantoj faros rimarkojn pri la vortoj, silaboj kaj literoj, tial ke ili havas la deziron skribi kaj legi.

Certe, kun sistema instruado, kiu, precipe kun etuloj **NE POVAS ESTI SCIENCA METODO**, estas ĉiam danĝere instruadi legadon tro frue.

Sed per nia natura metodo, ni ne riskas lacon, malŝategon. Ni do povas komenc tre frue. Jam antaŭ la kvina aĝ-

jaro, niaj etuloj korespondas kaj presas. Unue ili kopias la rakonton farigitan komuna aŭ la « leteron al la kamarado » eĉ ne sciante fari unu korektan literon. Sed tio estas tute grava afero por ili kaj ili kun ĝojo montras la unuajn « tekstojn », tamen preskaŭ tute fantaziajn! La etuloj ankaŭ multe ŝatas presi. Kaj, antaŭ la sesa, ili jam scias tre legeble skribi per tiu bloka **NATURA metodo**, kiu lasas ĉiun progresi sen malbona rapidigo, kaj tute frankvile ekzercadi.

Sed baldaŭ la infano konos sian propran nomon, tiun de « la kamarado »-korespondanto, kaj aliajn tre oftajn vortojn. Kiam li volos *mem* kompreni la tekstojn, ĉar li multe deziras kompreni, li serĉos la sekretan meĥanisman de la literarango. *La UNUA*, li iam krios: « Vidu: en « mama » ekzistas « ma »! » La unusilabaj vortoj estos tre valora helpilo. Ĉe ni ankaŭ instruistoj komencantaj utiligas (per tiuj vortoj trovitaj) paperbendojn. Sed baldaŭ ili konstatas ke tio nevideble rapidigas la lernadon. Kiam ili faras tion daŭre, tio estas por ke ilia ĉefo, S-ro Inspektoro, povu konstati kio jam estis farita! Kiam la Inspektoro konas la instruiston kaj la metodon, la diversaj nenaturaj rimedoj estas forlasitaj. Oni nur aldonas, iafaje, simplan liston de vortoj en kiuj ekzemple estas la silabo « ma », jam uzitaj aŭ trovataj en « vortoĉasado », t.e. novaj vortoj trovataj de la infanoj. Le venontan fojon, oni simple unu fojon relegas la unuan liston (ĉar la infanoj tion demandas) skribas alian, kaj viŝas la malnovan.

Mi ne povas ĉi tie detali la praktikadon de la korespondado helpe de la presitaj rakontoj kaj de la monata infangazeto bindita el ili, nek la teknikon pri presarto en lernejo.

Sed ni devas atentigi niajn legantojn pri du **FAKTOJ** :

— Se oni demandas al infano: « Montru al mi en la teksto la vorton « patrinjo », « kato », ktp., povas esti ke la infano tute rapide sukcesos. Sed, montrante la samajn vortojn al la sama infano, se ni demandas: « Legu tion... », povas esti ke li restos muta. Ekzistas granda diferenco inter rekonu vortojn diritajn kaj prononci ilin legante. Nur post multfoja rekono, instinkta legado venos, tre ofte kvazaŭ « eksplodo »: la vera laŭtvoĉa legado. Ŝajnis ke tia infano ne scios baldaŭ legi. Sed iun semajnon la lernanto sukcesis legi preskaŭ ĉion.

Jam la etulo unue « komprenis ĉion » de siaj gepatroj, kaj restis muta. Kaj subite jen ni havas senĉesan babilulon.

Multaj instruistoj ignoras tiun psikologian fakton. Estas ja multe pli malfacile ESPRIMI SIN OL KOMPRENI. Scienca pedagogio devas atenti pri tio.

— Estas eraro kredi ke la abstrakta sensignifa litero estas pli « simpla » ol vorto, kaj ankoraŭ pli grava eraro kredi ke ni devas igi la infanon fari nur tiom simplan laboron, ke tuj ĝi estu perfekta. « Li skribu longan liston kun la litero i. Tiel la kajero tuj estos bonorda kaj bela ». Kiam infano lernas ion malfacilan, sed kiun ĝi deziregas fari, ĝi ankaŭ lernas bloke, kaj rapide. Per bicikloj KIES HELPRADOJ MANKAS, ĉiuj lernas rapide. Oni ja falas, hezitas, baraktas, kaj senlace rekomencas. Unue estas tre malbone! Kial ne? Oni ridas pro la malsukcesoj, forlasas la ekzercadon (nur hodiaŭ) sed baldaŭ oni reekzercadas. Ĉi tie ankaŭ venas la sukceso, ofte neatendite.

Same lernas niaj infanoj, kun ardo, ridante kiam ili eraris, kuraĝe revenante al la laboro. Ni ne scias ĉu fine ili deĉifras pli malfrue, aŭ pli frue, ĉar naturon oni ne povas trudi. Sed tio, kion ni povas aserti estas ke tuj kiam ili komencas kompreni la plej uzatajn vortojn ili multege legas. Ili dum unu jaro ĉe mi sukcesis legi, ĉu en la lernejo, ĉu hejme,

tutan kolekton de « Infanaĵoj », t.e. almenaŭ 150 broŝuroj kun rakontoj verkitaj kaj ilustritaj de infanoj, 25 infanalbumoj (same, kun belaj infanpentraĵoj) kaj aliaj libroj.

Ni ne diras ke nia metodo estas perfekta, ĉar ni daŭrigas la kooperan diskutadon helpe de kolektiva eksperimentado. Sed NENIU el tiuj kiuj tiel instruas legadon laŭ la « natura metodo » akceptus reveni al sistemaj kaj false « raciaj » procedoj, kiuj tute ne konsideras ke lernantoj devas socie kaj KORE vivi en sia kolektivo, kun siaj SOCIAJ bezonoj: esprimigi, do komuniki kun la proksima kaj malproksima medioj, dank'al modernaj... (ne instruiloj, sed) VIVILOJ, VIVTEKNEKOJ (kiel korespondado, gazeto, ktp... kiel en la vera socio.

FREINET havis tiun meriton grupi ĉirkaŭ si en vasta Instituto la instruistojn havantajn tiun celon. Ni bedaŭras ke oni tro laŭvorte sekvis DECROLY, kiu korespondis kun FREINET kaj aprobis lin. Ni esperas ke tiom multaj spertoj helpos al la pedagogoj por starigi vere sciencajn pedagogion. Jam iuj venis al ni. Sed nia plej grava instigilo estas la komuna entuziasmo en la lernocambro kaj en la tuta KIMIL.

Roger LALLEMAND.

## Tiu numero estas la lasta sendita al nereakontoj

LA VALO DE TEGERNSEE, VERA TREZORUJO. *Turisma prospekto senpage havebla ĉe F-ino Anna M. ORTERER, del. de UEA, 13b Kreuth bei Tegernsee, Rathaus, Germanio.*

Belegaj fotoj kaj kolorbildoj, bedaŭrinde, germanlingva tiu prospekto perdas la duonon de sia intereso, malgraŭ la aldonita esperantlingva folio. Krome 16-paĝa aldono pri hoteloj, sed nur germanlingva. Ne estus granda kosto aldoni enkondukajn klarigojn en Esperanto!

A. A.

### ANONCETO

S-ro Stojko Dimitrov (mahala Velčevska, Trojan, Bulgario) fraŭla instruisto dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj per belfilatele afrankitaj leteroj kaj il. p.k. — Interŝanĝas E-gazetojn, fotojn, ktp. Anonco ĉiam valida.

### INTERHELPO

Por helpi niajn Moskvajn kamaradojn estigi Esperanto-kursojn inter siaj glerntoj, kaj starigi instruistan kulturan ligon, same kiel por prepari internacian korespondadon inter geknaboj, vi bonvolu sendi leteron al almenaŭ unu el la ĉi-subaj lernejoj:


Srednaja ŝkola N° 43. Per. Ostrovkogo N° 7 Direktoro Moskvo.

Srednaja ŝkola N° 172 Ul. Ĉehova 20 Moskvo.

Srednaja ŝkola N° 329 Kolpaĉnij per. N° P Direktoro E.G. Tancarova Moskvo, SSSR.

Por KIMIL, Roger LALLEMAND.





*Unuope ricevitaj verkoj estas menciataj, duope — recenzataj. Ĉiu recenzanto liberas en siaj diroj, pri kiuj la Redaktejo ne respondecas.*

LA ORA METODO de D-ro William PERRENOUD — *Geoniaj Eldonoj*, 13 Fbg Gare, Neufchâtel (Svislando). 16 p. 15 x 10,5. Prezo : 1sv. fr. ; 10 ekz. : 9 sv. fr. ; 100 ekz. : 75 sv. fr.

D-ro Perrenoud publikigis libreton titolitan « La Ora Metodo », jam uzita en la internaciaj kursoj pri Esperanto kaj Geonismo en kastelo Munchewiller. Konstatinte, ke « oni povas ŝpari tempon se oni atentis pri kelkaj principoj de ĝenerala lingvo-instruado », la aŭtoro proponas al ni dudek mallongajn tekstojn entenantajn la « bazan vortprovizon », kiu nur malmulte kreskis, (tion oni povas konstati komparante la « Unuan Libron » de Zamenhof kun la lasta eldono de « Plena Vortaro »). Tiu baza vortprovizo konsistas el : 16 finiĝoj, 10 personaj pronomoj, 85 korelativoj, 17 numeraloj, 5 interjekcioj, 73 vortoj « diversaj », entute 300 « baz-elementoj », kies tuto formas la « mekanismon » de Esperanto. Ĉiu leciono, aŭ teksto, prezentas 15 elementojn.

Laŭ la aŭtoro, post ellernado de tiuj 300 baz-elementoj la lernanto « kapablas aŭtonome konduki sian veturilon kaj meritas la pilotan diplomon ». Mi tute konsentas. La baz-elementoj estas tre metode prezentitaj, kaj la tekstoj, malgraŭ la severa prezentado de la elementoj ne ŝajnas « artefaritaj ». Ĉiu teksto formas « tuton » sufiĉe interesan. Sed ankaŭ la metodo estas « baza ». Certe ĝi multe helpas al la instruantoj, sed tiuj devos esti tre lertaj por uzi ĝin taŭge, kaj devos aldoni multon.

P. BABIN.

LA SENPERA VERBIGO DE ADJEKTIVOJ de H. A. De Hoog. *Represo de artikolserio el « Dia Regno »* 1955. *Libroservo de K.U.N.E., Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.* 32 p. 10,5 x 16. Prezo : 0,60 florenoj.

Tiu verketo estiĝis el la rimarko de la prezidanto de nia akademio, S-ro J. ISBRÜCKER dum la Harlema Kongreso, ke en bona Esperanto, oni devas ne diri : « Li pravas, ŝi malsanas », sed : « Li estas prava, ŝi estas malsana... »

La aŭtoro entreprenas tre objekte studi la demandon kaj en lingvaĵo klara, li eksponas paŝo post paŝo la rezulton de siaj esploroj. Vere mi miris ke tia gramatika studo estas ne nur neenua, sed eĉ plaĉa. Li vere havas facilon klare ekspone sufiĉe nuancitajn aferojn kaj mi ne dubas ke jen estas tre interesa kontribuo al la studo pri vortfarado iniciatita de DE SAUSSURE kaj establita de la « simbiozuloj » KALOCSAY kaj WARINGHIEN, tiuj du kulminoj de nia literaturo.

Ofte la aŭtoro uzas alilingvajn komparojn, tradukajn komparojn. Mi emus konsideri tiajn demonstrojn nur akcesoraj. Analogio neniam estas bona konsilanto. Komprenoble ĝi povas sugesti solvon, indiki vojon ; kaj en tia studo nepre valoras rigardi iom pli vaste. Sed neniel traduka argumento, alilingva motivo devas esti determinanta en nia lingvo : tiu ĉi ne estas « helpa », nur duagrada, nur post la aliaj, sed vere sendependa lingvo. Ĝi havas siajn proprajn vojojn kaj estus eraro devoĵigi ĝin nur pro tio, ke aliaj lingvoj uzas alian direkton. La riproĉo ne atingas la aŭtoron, kiu firme establas siajn konkludojn sur fasko da motivoj kaj por kiu komparo estas nur maniero sugesti komprenon.


En paragrafo 15 kaj sekvaj estiĝas longa diskuto, cetere interesa per si mem, pri la diro de ZAMENHOF : « i » ne estas « esti ». Pri tiu punkto mi volas meti demandon : ĉu ne temas en tiu lingva respondo (L.R. p. 70) pri konjugado ? Alidire, ĉu tiu « esti » ne estas simple la helpverbo de la esperanta konjugado ? Kaj se okaze ĝi ja samformas kiel la predikato « esti », ĝi tamen plene fremdas al ĝi : Zamenhof parolis nur pri « esti » uzata kiel konjuga helpverbo. Mi konsentas ke tiu maniero vidi la problemon estas kelke rapida : ĝi cetere forprenus de ni la ĝuon legi la klaran motivadon de H.A. DE HOOG kaj ankaŭ lian opinion rilate la sintenon de ZAMENHOF al la propra reformprojekto kontraŭvole farita nur por plezuri al sia amiko JAVAL. Apartan studon pri ĉi-punkto estus ankaŭ interesa !

A. A.

# NI LERNU PER BILDOJ



## En la Ĝardeno



1. la arbo. — 2. la tero. — 3. la legomo. — 4. la ĝardenisto. — 5. la branĉo. —  
6. la folio. — 7. la birdo. — 8. la aleo. — 9. la arbeto. — 10. la florpoto.

— Estas multaj floroj en la ĝardeno.  
— La floroj estas blankaj, ruĝaj, flavaj, ktp...

— La arbo kreskas en la ĝardeno.

— La piroj kreskas sur pirarboj, la pomoj kreskas sur pomarboj.

— La folioj de la arboj estas verdaj.

— La arboj estas altaj sed la arbetoj estas malaltaj.

— La birdo saltetas sur la aleo.

— la ĝardenisto plugas la teron.

### DEMANDOJ

Kia estas la folio? Ĝi estas verda.

Kie estas la ĝardenisto? Tie, en la ĝardeno.

Sur kiu arbo estas la birdo? Sur tiu, kiu estas malalta.

Kie kreskas la floro ?  
 Cu vi ŝatas la florojn ?  
 Kion la ĝardenisto rigardas ?  
 Kiu rigardas la floron ?



Cu la birdo estas granda ?  
 Kie estas la birdo ?  
 Kio estas sur la arbo ?  
 Kiom da folioj estas sur la arbo ?



Cu vi ŝatas la fruktojn ?  
 Kiun frukton vi manĝis hieraŭ ?  
 Kie estas la fruktoj ?  
 Kion manĝas la infano ?



Kion plugas la ĝardenisto ?  
 Kiu plugas la teron ?  
 Kie la ĝardenisto estas ?  
 Kiom da legomoj estas en la ĝardeno ?



Atanas D. Atanasov — Ada.

# LERNU KAJ INSTRUU



## Kvina Leciono

Nian Esperanto-kurson partoprenas 32 personoj de plej diversaj profesioj kaj aĝoj. Inter ili estas oficistoj, studentoj, gimnazianoj, metiistoj, laboristoj, unu kuracisto, unu pastro, unu oficiro, du dommastrinoj kaj eĉ du junaj vilaĝanoj-agrikulturistoj.

Laŭ aĝo la kursanoj estas de 16- ĝis 60-jaraj.

Nature, ne ĉiuj kursanoj egale rapide povas kompreni la diversajn gramatikajn regulojn tial, ke ne ĉiuj estas egale inteligentaj. Estas kelkaj, kiuj malfacile lernas. Tamen neniu el ili malesperiĝas. Ĉiuj lernas plej fervore kaj diligente. La pli kleraj klarigas al la malpli kleraj la malfacilajn regulojn kaj tiel ili helpas la instruiston. Neniam mi vidis similan entuziasmon, kia regas en nia kurso.

Specialajn simpatiojn ĝuas la du vilaĝanoj. Ilia ĝojo pro tio, ke ili lernas kaj povas komprenigi sin per unu fremda lingvo, estas senlima. Prezentu nur al vi : por preni la lecionojn de Esperanto, tiuj ĉi bravaj knaboj devas marŝi piede la vojon inter sia vilaĝo kaj la urbo — kaj tion dufoje semajne !

Certe, vi demandas : kial do vilaĝaj knaboj bezonas Esperanton ? Al mi tio estas tute klara : tial ke ĉiu homo deziras koni almenaŭ unu fremdan lingvon kaj plivastigi sian intelektan horizonton, ne stari kiel senparola besto aŭ kiel surda kaj muta homo en ĉesto de alilandanoj. Por tiuj ĉi vilaĝaj knaboj Esperanto estas lumo, ĝi estas fenestro al la vasta mondo, ĝi kontentigas ilian soifon por pli vasta intelekta vivo. Jen kial ili lernas tiel persiste kaj kun tia ĝojo la internacian lingvon.

La kurson partoprenas ne nur Bulgaroj : inter la kursanoj estas ankaŭ du Hebreoj, unu Turko kaj eĉ unu Franco, kiu loĝas en nia lando. La Hebreoj estas el la urbo Plovdiv, la Turko el la urbo Sumen kaj la Franco estas el Tuluzo. La Plovdivanoj kaj la Sumenano estas en konstanta konkuro : ĉiu havas ambicion atingi pli brilan sukceson, kio distingas ankaŭ iliajn urbojn, kiuj en la antaŭaj jaroj ludis gravan rolon en la Bulgara Esperanto-Movado. Sed la Tuluzano ne postrestas : lia ambicio estas ja distingi sian nacion !

La Hebreoj kaj la Turko estas niaj samlandanoj, kvankam ne niaj samnacionoj. La Franco estas alilandano kaj alinaciono.

Tio ne gravas : ni ĉiuj ja estas samideanoj !

### KORELATIVAJ VORTOJ.

NENiu, NENio, NENia, NENie, NENiam, NENiom, NENiel

Kiu, Tiu, Ĉiu, Neniu.

KiAL ? (pro kio, pro kia kaŭzo ?), tiAL, ĉiAL, neniAL.

Kial la afero ne prosperas ? — Ĉar ĉiuj ordonas kaj neniu laboras.

Ĉar

Tial ĉar

Pro tio ke

Tial ke

ĉiu komandas kaj neniu laboras.

NOTO. — Por kelkaj nacioj (speciale por la slavaj) estas bezone atentigi ke en Esperanto sufiĉas nur unu nea vorto (ne, neniu, nenie, neniam, ktp.),

*por nei la penson en la propozicio (en la bulgara lingvo estas en tiu kazo du neaj vortoj). Do oni atentu ke estas*

**Korekte**

**Nekorekte**

*Neniu venis  
Nenie mi vidis lin  
Mi forgesos neniam  
Nenio okazis*

*Neniu ne venis  
Nenie mi ne vidis lin  
Mi ne forgesos neniam  
Nenio ne okazis*

**SUFIKSO**

AN signifas loĝanton, membron, adepton de tio, kion esprimas la radikvorto :

URB-AN-O : homo kiu loĝas en urbo.

SOFI-AN-O : komo kiu loĝas en Sofio.

PARIZ-AN-O : homo kiu loĝas en Parizo.

GRUP-AN-O : ano de grupo, membro de grupo.

SOCIET-AN-O : membro de societo.

Kristo, KRISTANO : adepto de la instruo de Kristo.

Islamo, ISLAMANO.

Samurbano, SAM-URB-AN-O : homo kiu loĝas en la sama urbo.

SAM-VILAG-AN-O.

Samlandano, Samnaciano.

Samideano, SAM-IDE-AN-O : adepto de la sama ideo.

**NOTINDAJ VORTUZOJ**

Partopreni : preni parton (de io, en ia afero) : mi partoprenos la ekskurson, la kongreson.

Postresti : resti post iu alia, resti malantaŭe.

Ne gravas : ne estas grave.

**EKZERCOJ**

1. Kial vi vizitas la Esperanto-kurson ? — Ni vizitas la Esperanto-kurson por... ĉar... tial ke...

2. Mi ne aĉetis la libron tial ĉar...  
Mia kuzo ne venis hieraŭ tial ke li...  
Ciuĵ ŝatas lin nur tial ke li...

3. Neni... el ni povos veni morgaŭ.  
Neni... kreskas tiaj belaj floroj, kiaj estas en ŝia ĝardeno.  
Neni... libro estas tiel malpura kiel la via.  
Mi neni... povas kompreni tion, kion vi diras.  
Ili havas neni... da pano.  
Neni... la suno brilis tiel gaje kiel en tiu tago.

**KOREKTU EN LA TRIA LECIONO**

— *paĝo 9* : ĉe la prepozicio KUN, unu linio estis ellasita post la dua. Ĝi tekstas : « mi ankaŭ mian fraton. Li venas kun malplenaj manoj. Li renkontis miajn ».

— *paĝo 10* : meze estis ellasita akuzativo ĉe rekompostado : Legu : Post la verbo *simpatii* kelkiuj uzas la prepozicion *kun*.

# Distra Paĝo

## KONKURSO N° 3

Jen la solvo :

*Horizontale.* — 1. Mantelhava ; 2. Albeen ; 3. LB, Arip, At ; 4. Vip, IM, TLA ; 5. Azar, Miaù ; 6. Rolo, Tard ; 7. MNM, Am, Rma ; 8. Uo, Arao, In ; 9. Stulta ; 10. Infanterio.

*Vertikale.* — 1. Malvarmumi ; 2. Bizono ; 3. Na, Palm, Sf ; 4. Tla, Ro, Ata ; 5. Ebri, Arun ; 6. Leim, Malt ; 7. Hep, MT, Ote ; 8. An, Tiar, Ar ; 9. Alarmi ; 10. Antaŭdanko.

Gajnintoj : S-ro Bourry, S-ro Calvet, S-ro Caubel, S-ro Chevalier, F-ino Deygas, S-ino Le Goff, S-ino Pallard, F-ino Texier gajnis 2 poentojn.

Post tiu konkurso S-ro Chevalier gajnis 360-frankan libron.

Korajn gratulojn.

## KONKURSO N° 4

Jen la solvo :

*Horizontale.* — 1. Ekspozicio ; 2. Kulo, Vet ; 3. SKK, KK, Pec ; 4. Po, Bano, Pu ; 5. Kanado ; 6. Eraroj ; 7. Ti, Olin, Ot ; 8. Alo, Os, Ils ; 9. Doni, Arun ; 10. Oficialiĝi.

*Vertikale.* — 1. Eksportado ; 2. Kuko, Ilof ; 3. SLK, Ke, Oni ; 4. Po, Baro, Ic ; 5. Kanaro ; 6. Knaris ; 7. Iv, Odon, Al ; 8. Cep, Oj, Iri ; 9. Itep, Olug ; 10. Oicutitsni.

Gajnintoj : F-ino Arnould, S-ro A. Caubel, S-ro Chevalier, F-ino Deygas, S-ro Berthold Fischer, S-ro Génuit, S-ino Lavallée, F-ino Robin, F-ino Texier, F-ino Gudula Thénée gajnis 2 poentojn. S-ino Villette gajnis 1 poenton.

Post tiu konkurso S-ro Caubel gajnis 300-frankan libron. Ni kore gratulas ĉiujn.

## KONKURSO N° 6

1 2 3 4 5 6 7 8 9 10

1										
2	■									■
3			■							■
4				■				■		
5					■					
6						■				
7				■				■		
8			■						■	
9	■									■
10										

*Horizontale :*

- Loko, kien oni vojaĝas por plezuro.
- Iras eksteren.
- Fonetike : nomo de molekulo aŭ de atomo, kiu gajnis aŭ perdis elektronojn : inverse : lasta parto ; prefikso.
- Inverse : batilo (r) ; konjunkcio ; spirebla gaso (r).
- Inverse : promesi al Dio ; disketo el nefermentinta pano (r).
- Komenco ; antaŭparolo de veturilo.
- Inverse : participa finaĵo (r) ; inverse kaj fonetike : parto de spaco ; nenormala malgrandegulo (r).
- Nedifina pronomo ; inverse : leda kapŝirmilo (r) ; prepozicio.
- Sukera substanco (r).
- Respekta, honoriga donaco.

*Vertikale :*

- Kiu profesie skribas per maŝino.
- Ĥemia elemento, kiu emanis el la radiumo.
- Prefikso montranta ripeton ; nomo de belega esperanta kanto ; prefikso.
- Aparato ; fonetike : kapablo uzi pli malpli energie la spiritaĵojn ; fonetike : karaktero de intelekta verko produktata per la elekto pri la skribitaj detaloj.
- Homa brusto ; Ĥemia kombinaĵo (r).
- Rapida ripetado de du sonoj ; natura gumo.
- Fandita varmega materio, kiu elfluas el vulkanoj (r) ; fonetike : remaĉulo ; havi ideon pri ies karaktero (r).
- Verba finaĵo ; kudrilego (r) ; inverse : kapo de dombesto.
- Feliĉegaj.
- Karaktero de io bone adaptita al sia destino.

Bonvolu sendi viajn solvojn ĝis la 25-a de la venonta monato al S-ro Guillot, Cours de la 4<sup>e</sup>-République, Gaillard (Hte-Savoie), Francujo.

*Kelkaj abonantoj petas plian ekzempleron de la revuo por propaganda celo.*

*Ili sendu la adresojn de eventuale interesigontoj al la administranto, kiu zorgos pri la rekta sendo de specimenoj.*

# PERANTOJ DE I. P. R.

---

BRITA : « *The British Esperanto Association* », 140, Holland Park Avenue, London, W 11.

Jarabono : 8 ŝilingoj.

BULGARA : *Bulgara Esperantista Asocio, Sofia*, Bul. Stalin n° 40.

Jarabono : 8 levoj.

DANA : « *Dansk Esperanto-Forlag* », Ingemannsvej 9, *Aabyhof*. (Cek-konto : 16.295).

Jarabono : 8 kronoj.

GERMANA : Helmut ROSSLER, 22 b, *Hechtsheim bei Mainz*, Friedensstr. 15. Cek-konto : 43 357 Ludwigshafen/Rhein.

Jarabono : 4,8 germanaj markoj.

HISPANA : E. CALVET, Pl. Gral Sanjurjo, 7, *Tarragona*. (Konto n° 956-293 ĉe « Banco Espanol de Credito »).

Jarabono : 44 pesetoj.

ITALA : Eduardo ZUMBO, Via del Carmine, 4, *Torino*.

Jarabono : 700 liroj.

JUGOSLAVA : Josip VAJDLIH, Podolje 15, *Zagreb*. (Cekkonto : Cradska Stedisnica Zagreb, 406-606/I br 46 53).

Jarabono : 330 dinaroj.

NORVEGA : Erling HOLTEN, *Leangen i Strinda*.

Jarabono : 8,50 kronoj.

SOVET-UNIA : Roberto DVORKIN, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, *Leningrad, 22, Kirovskij 42*.

SUOMA : Joel VILKKI, *Somero*, poŝtkonto : Tu 60 253.

Jarabono : 300 suomaj markoj.

SVEDA : « *Eldona Societo Esperanto* », Box 19071, *Stockholm* (Poŝtĉeka Konto : 578).

Jarabono : 6 kronoj.

USONA : Jarvis E. BUSH, 3.700 North 75-th Street, *Milwaukee 16, Wisconsin*.

★ ★

ALIAJ LANDOJ : Sin turni al nia administranto : E. BIDOIT, 6 rue de la Paix, *Baugé* (M.-et-L.) Francio. (Poŝtĉeka konto : 143-867 *Nantes*). Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. *peras la abonojn*. Jarabono : 400 francaj frankoj aŭ egalvaloro.

*Ni daŭre serĉas perantojn.*

Diplom-Franches  
309 Verdunallee, Am Meldauer Berg 1977



# La Esperantista Kulturdomo

Kastelo « GRÉSILLON »  
BAUGÉ (M.-et-L.) Francio  
Tél. 34

## FRANCA KULTURDOMO

### Restadoj dum somero 1957

La Kastelo Grésillon estos malfermita de la 1-a de Junio ĝis la 14-a de Septembro 1957.

**1-a Periodo :** 1-an de Junio — 14-an de Julio  
Kursoj de Esperanto por komencantoj — Instruado de amatora bindarto  
Turismaj karavanoj

**2-a Periodo :** 14-an de Julio — 24-an de Julio

*Sensacia Manifestacio :*  
*Kulturaj Internaciaj Ferioj*

Kun Profesoroj AULD, LAPENNA, WARINGHIEN,  
Dro ALBAULT kaj Ing. WATIER

**3-a Periodo :** 25-an de Julio — 10-an de Aŭgusto

*La Franca Lingvo*  
por alilandaj samideanoj

Eksterordinare bona metodo por instrui rapide la francan lingvon pere de Esperanto, kursoj por komencantoj kaj por perefktigemuloj. Necesas uzi sufiĉe bone Esperanton.

**4-a Periodo :** 10-an de Aŭgusto — 31-an de Aŭgusto

*Somera Lernejo* - Tri kursoj de Esperanto

**5-a Periodo :** 1-an de Septembro — 14-an de Septembro

*Fakaj Renkontiĝoj* - Liberaj Ferioj